A.E.A.-informilo

Numero 10 Julio 2012

# Pliriĉiĝo de la AEA-biblioteko

De tempo al tempo nia **Astura Esperanta Asocio** ricevas, el la familioj de forpasintaj samideanoj, ĉi ties esperantan libraron. Antaŭ ne multe da tempo ni ricevis la legacojn de Julio Argüelles kaj José Palacio Tuero. Tiele, kaj pro aliaj donacoj kaj la aĉetaĵoj de la E-grupo mem, iom-post-iom nia biblioteko pligrandiĝas kaj pliriĉiĝas.

Sed lasttempe la pligrandiĝo de nia libraro estis subita kaj grandkvanta, kaj tio estis rezulto de unusola donaco, tiu kiun faris al ni la nepo de nia neforgesebla samideano Adonis González Meana. Ĉi sola alportaĵo preskaŭ duobligis la enhavon de nia biblioteko. Estis necese ke la **Universitata Katedro "Jovellanos"**, en kiu estas enkadrigita nia E-asocio, provizu al ni kromajn ŝrankojn por enteni tiel valoran kaj ampleksan libraron.

Ne nur libraro, sed ankaŭ kolektoj de revuoj, kaj ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en kaj pri aliaj lingvoj: franca, angla, rusa…, kaj pri tre diversa temaro. La intereso de nia klera samideano Adonis ampleksis multajn kultur-branĉojn, kaj tio respeguliĝas en lia (de nun, nia) biblioteko.

La suba foto en ĉi tiu paĝo montras kiel restas la granda libro-bretaro ene de nia malgranda ejo. Ni esperu ke, tiel la libraro kiel la ejo mem, havu grandan utilon por personoj dezirantaj lerni kaj praktiki la Internacian Lingvon. Dum la lerno-kurso nun finiĝanta ni ne sukcesis veki grandan intereson pri nia afero en la universitata medio kie troviĝas nun nia E-sidejo. Eble en estontaj lerno-jaroj nia penado tiurilate estos pli profitdona. Al tiucela laboro ni alvokas ankaŭ la tutan membraron de la Asocio. Esperanto, kiu nun fariĝas 125-jara meritas plian sukceson.






